



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 25-a de Julio 2022

Ĉeestantoj (zome): Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Inbar Mor; Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi. **Gastoj:** Jinon Meiri, Cvi Ŝolt, Laima.

Tiu ĉi kunsido anstataŭas kaj daŭrigas la originalan de la 4-a de Julio, kun parta fizika ĉeesto, kiu malsukcesis pro teknikaj problemoj.

La Protokolo de la antaŭa (junia) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

a) **Ŝlomo:** ĉio pretas por la transiro al **Bank Mizraĥi-Tefaĥot**, krom multaj subskriboj de la advokato. **Jehoŝua:** la postuloj de la banko estas troaj – ĝi povus anstataŭe preni la dokumentojn de **Bank Igud**. Mi ne plendis ankoraŭ pli alte, ĉar mi atendas la reagon de la banko.

b) **Amri** prelegos en ILEI, sed por tio oni devas esti membro. La vicprezidantino de ILEI petis de Amri forviŝi lian landnomon apud lia nomo. Li nete rifuzis – sed intertempe oni publikigis la liston de la prelegantoj sen “Israelo” por ne endanĝerigi la iranan prezidanton de ILEI. Luiza nuligis sian partoprenon, ĉar ili cenzuris la bahaan parton de ŝia kontribuo, por ne mencii Israelon. Laŭ la regularo de UEA ILEI ne rajtas resti Aliĝinta Faka Asocio de UEA, se ĝi permesas al si tian diskriminacion! La solvo de ILEI estis, ke ili forstrekis **ĉies landnomojn**.

c) **Jehoŝua:** pri la ukrainia-rusia milito kelkaj el ni ricevis de la polo Marian Zdankovski “hontoliston” de e-istoj (ĉefe rusiaj) subtenantaj la fiagon de Putin. **Amri:** en la ĵusfiniĝinta BET oni forte kritikis la tro mildan deklaron de UEA pri tiu milito. **Mikaelo:** en la venonta numero de IE aperos intervjuo kun la prezidanto de UEA pri tiu temo.

ĉ) **Jehoŝua** raportas pri progreso de la konstru-evakua projekto en strato Ĥelmit (Bat-Jam), kie situas nia Dratverejo.

2. Jarduona plenumo kontraŭ buĝeto (Ŝlomo)

Unuanime aprobita.

3. Luigo de nia oficejo (Amri, Ŝlomo)

Ĉar Lior Hass iom neglektis la aferon, Amri parolis kun li, kaj sekve li aperigis la reklamon. La pago devus esti 3,000 NIS plus VAT unufoje kaj procentaĵo ĉiumonate – neniom kaze de malsukceso. **Eran:** ĉu ni faris nenion en Yad2? Kaj ekzistas firmaoj, kies modeloj estas aliaj, ol tiu de Hass!

4. La Somerfina Renkontiĝo (Jehoŝua)

Ĝi estas planita (kiel pasintjare) en la koŝera restoracio **Piazza Grande** en Saron, lunde, la 29-an de Aŭgusto. Jehoŝua postulos reagon de la ELI-anoj, kaj nur se estos almenaŭ 10 devontiĝoj, li komencos la aranĝojn.

**5. Eventuala plialtigo de la Dratvereja lupago** (Amri)

La kontrakto renoviĝos en Aŭgusto kaj ni havas la rajton plialtigi ĝin. En la ĉirkaŭaĵo similaj loĝejoj estas reklamataj por ĉ. 4,000 NIS. Aliflanke – niaj loĝantoj investis en la renovigo, kaj ni preferus konservi ilin. Propono: Lior Hass petu de ili 3,600 siklojn. Kaze de malkonsento, ili povos telefone paroli kun ni kaj prezenti sian proponon.

6. La “donaco” de Google (Dror)

La postuloj estas laŭ landoj. Dror jam sendis, sed resendos denove al la estraranoj. La esenco estas, ke “se ni volas uzi iliajn servojn, ni devas obei iliajn regulojn”. Tamen ne estas limdatoj por ĝi.

7. La estonto de niaj Landaj Kunvenoj (Amri) – prokrastita al la venonta kunsido.

La venonta kunsido: lunde, la 5-an de Septembro 2022, je 20:00
(en Alon-Turo-2, kaj hibride).

Protokolis: Gabi Zeevi